



Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto
American Association of Esperanto Teachers

(Sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj)

(Branch of the International League of Esperantist Teachers)

Numero 188

ISSN: 0002-7499

marto 2012

La Bulteno Revenas

Kiel vi tutcerte rimarkis, nia *Bulteno* dum multaj monatoj ne aperis. Mi konfesu, kaj emfazu, ke la kulpo restas sole ĉe mi (Gary), la nova redaktoro, kaj neniu alia. Ne utilus provi klarigi la diversajn kialojn (parte sed ne tute temas pri malsano). Multe pli gravas diri, ke mi sincere pardonpetas pro la prokrasto, kaj mi strebos aperiĝi la venontajn numerojn multe pli akurate kaj ofte.

Unu alia tre grava afero: **Ni ĉiuj remembriĝu en AAIE kiel eble plej baldaŭ.** Kune kun ĉi tiu *Bulteno* en papera formo (kiu estas poŝte sendata ankaŭ al tiuj, kiuj abonas la elektronikan version) estas aliĝilo kaj koverto por resendi ĝin.

Denove mi pardonpetas pro la malfrua elsendo de ĉi tiu numero.

Aferoj de AAIE

Protokolo de 52-a Jarkunsido de la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto

*ĉe hotelo "Hyatt Summerfield Suites" en Emeryville, Kalifornio, Usono
la 19-an de junio 2011 de 14h30 ĝis 15h20
(Kadre de la landa kongreso de Esperanto-USA)*

Ĉeestis entute 11 homoj, el kiuj 10 estis AAIE-membroj (Duncan Charters, Elizabeth Dorcas, Filipino Dorcas, Ellen Eddy, Enrique Ellemberg, Gary Grady, Ron Glossop, Lucy Harmon, Doroteo Holland, kaj Chuck Mays) kaj unu ne-membro (Bonnie Fonseca-Greber el Kentucky)

A. Ĉiu ĉeestanto ricevis kopion de la tagordo kaj jar-raportoj (inkluzive de la Prezidanta raporto kiu ne aperis en la maja *Bulteno*, kaj la raporto de la Eduka

The Bulletin Returns

As you've surely noticed, our Bulletin has not appeared for many months. Let me confess, that the fault resides only with me (Gary), the new editor, and no one else. It's not worth trying to explain the various reasons (illness was a contributing factor). It's more important to say that I sincerely apologize, and I'll strive to publish future issues much more promptly and often.

One other very important matter: **We should all renew our memberships as soon as possible.** Together with this *Bulletin* in paper form (which is being sent by mail also to those who subscribe to the electronic version) is a membership form and an envelope for returning it.

Again I apologize for the delayed publication of this issue.

Sekretario Sheri Wells, kiu ne povis ĉeesti la jarkunsidon) kaj liston de AAIE-membroj.

1. Entute estas 48 membroj de AAIE
 - a. 20 el ili estas dumvivaj,
 - b. 24 membroj deziras ricevi elektronikan version de ĉiuj informoj, inkluzive de la AAIE-Bulteno kaj la Pedagogia Revuo de ILEI.

Redaktoro: Gary Grady, 3119 Lassiter St, Durham NC 27707-3888 USA <Gary@DGaryGrady.com>

Prezidanto: Ron Glossop <rglossop@mindspring.com>

Vic-Prezidanto: Jeremy Aldrich <gxeremio@gmail.com>

Eduka Sekretario: Sherry Wells <esperantosherry@tm.net>

Koresponda Sekretario: Dorothy Holland, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara CA 93111-2521 USA <dorothyjeanh@gmail.com>

Kasisto: Chuck Mays <charles.o.mays@gmail.com>

<http://aaie.us> <http://ilei.info>

- B. Prezidis prezidanto Ron Glossop, kiu unue prezentis la ĉeestantajn estraranojn: vic-prezidanto Gary Grady kaj Doroteo Holland, redaktoro de nia Bulteno
- C. Ron faris la jenajn anoncojn:
1. Ni paŭzis por momento da silento por memori AAIE-anon Henry Studer, kiu forpasis la 10-an de februaro, 2011.
 2. La kvar reprezentantoj de AAIE ĉe la ILEI-konferenco en Kopenhago, Danlando, ĉi-somere estas Duncan Charters (kiu ankaŭ estas la ILEI-vicprezidanto), Vilĉjo Harris, Chuck Mays, kaj Ron Glossop (la Usona sekciestro).
- D. Filipino Dorcas proponis, kaj Ellen Eddy subtenis, ke ni akceptu la protokolon de nia lastjara jarkunsido en Vaŝingtono. La propono estis unuanime akceptita.
- E. Jar-Raportoj de la Postenuloj
1. 1. Kasisto Chuck Mays klarigis la AAIE-financan staton, kiu montras ke nun la saldo estas \$2780.94, kaj dum la pasinta jaro la elspezoj de AAIE estis \$549.19 pli ol niaj enspezoj. Filipino Dorcas proponis, kaj Ellen Eddy subtenis, ke ni akceptu la raporton de la kasisto. La proponon oni akceptis unuanime.
 2. 2. Beth Davis petis ke oni faru la jenan korekton en la skribita raporto de la Eduka Sekretario: Anstataŭ "two monthly conversational gatherings led by Beth Dorcas in Texas" oni anstataŭu "two monthly gatherings in which she plays with the children using Esperanto."
 3. 3. Gary Grady konsentis esti la nova Redaktoro de la AAIE-Bulteno. (Doroteo Holland finfine rezignis post 46 jaroj en tiu posteno!)
- F. Raporto de la Kandidatiga Komitato kaj Voĉdonado por 3 Postenuloj
1. Balotilo aperis en la maja *Bulteno*
 2. Naŭ (9) balotiloj estis ricevitaj de Doroteo per poŝto kun la jenaj rezultoj:
 - a. Ronald Glossop por prezidanto: 9 jesaj voĉdonoj
 - b. Jeremy Aldrich por vic-prezidanto: 9 jesaj voĉdonoj
 - c. Doroteo Holland por Koresponda Sekretario: 9 jesaj voĉdonoj
- d. Aprobis proponitajn ŝanĝojn en la Statuto: 7 jesaj voĉdonoj (2 ne voĉdonis)
3. La Prezidanto petis ke la ĉeestantoj voĉdonu, kun la rezulto ke oni unuanime aprobis ĉiujn kandidatojn kaj la statutajn ŝanĝojn.
 4. Sekve, la Prezidanto deklaris ke ĉiuj proponoj sur tiu balotilo estas aprobitaj. (Sed ŝajne ni bezonos pli da voĉdonoj por la proponitaj ŝanĝoj en la Statuto ĉar ni bezonos voĉdonojn de duono de la membroj.)
 5. Chuck Mays indikis ke li konsentas esti la estro de la Kandidatiga Komitato por la venonta jaro.
- G. Pri financaj aferoj (en la angla)
1. Treasurer Chuck Mays reported that "in the previous year 2009-2010 our expenses exceeded income by \$520.49, and in 2011 so far our expenses exceed our income by \$549.10.".. and that "in each year, about \$300 of expense is to pay ILEI for life members...The other expenses are to reimburse for the newsletter and other authorized expenses, and to pay ILEI dues for the remaining members (approximately 28 non-life members). We have about \$2800...in the account so we can maintain this level of income and expenses for about 5 years and then we will not be able to pay our ILEI dues from the dues received each year. Even if we have no expenses other than ILEI dues, our income is about \$150 less than the amount we need to pay ILEI each year."
 2. Dorothy Holland moved, and Beth Dorcas seconded, that AAIE no longer accept life memberships. Motion passed unanimously.
 3. It was suggested that, as a corollary to this motion, the present life-members of ILEI be encouraged to give an extra donation to AATE each year.
 4. It was also recommended (without a formal vote) that current life members of AATE who now receive publications via regular mail switch to electronic mail, thereby saving the added expense of postage. (Phil Dorcas and Ellen Eddy immediately agreed to do this.)
- H. Je 15h20 Prezidanto Glossop deklaris ke la 52-a jarkunveno de AAIE estas fermita.

*Respekteme submetita de Doroteo Holland
kiu anstataŭis Korespondan Sekretarion Sally Lawton*

Aliaj novaĵoj pri AAIE

Ŝanĝoj en la Statuto aprobitaj

En septembro 2011 estis ricevita 27 voĉdonoj favoraj al la proponitaj amendoj en la Statuto kontraŭ 2 malfavoraj. Por aprobi la amendoj necesas, ke minimume du trionoj el la voĉdonoj estu favoraj, kaj ke la minimume duono el la membraro voĉdonu.

Ĉar ambaŭ postuloj estis plenumitaj, la amendoj sukcesis. Sekve, la unua frazo de sekcio VI nun tekstas "LA ESTRARO konsistas el la redaktoro kaj la kvin elektitaj postenuloj" (sen la vortoj "el kiuj ne pli ol tri estas elektitaj en la sama jaro", kiuj antaŭe aperis fine de la frazo), kaj paragrafo VI. F. nun estis ŝanĝita de "La prezidanto rajtas

nomi unu sekciestron por trakti aferojn kun ILEI." al "La prezidanto servas kiel la sekciestro por trakti aferojn kun ILEI." Paralelaj ŝanĝoj aperas en la anglalingva versio. La tuta Statuto estas legebla en nia retejo ĉe <http://aaie.us>. Klaku la vorton "Statuto" maldekstre de la paĝo, kaj elektu la butonon "en" aŭ "eo" por elekti la anglan aŭ Esperanton.

Jarkunsido de AAIE en 2012

La 53-a Jarkunkido de Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto okazos dum la 60-a Landa Kongreso de Esperanto-USA ĉe la Universtitato de Teksaso en Dalaso de la 22-a ĝis la 25-a de junio, 2012. Eblas membriĝi en la

landa kongreso rete ĉe www.Esperanto-USA.org/retbutiko, aŭ vi povas ricevi surpaperan informon de la aliĝilon de Esperanto-USA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530,

510-653-0998, eusa@esperanto-usa. Pli da informo pri la jarkunsido aperos en estontaj numeroj de la *Bulteno*. Vidu ankaŭ la kalendaron en nia retejo ĉe <http://ilei.org>.

Aferoj de ILEI

AAIE partoprenas Programon E125 de ILEI

La 26-an de julio 2012 okazos la 125a datreveno de la eldono de la Unua Libro de d-ro Esperanto en 1887. Honore al tiu grava dato, Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj okazigas internacian programon E125 kun la celo informadi pri Esperanto kaj instrui la lingvon al publiko. Inter aliaj aferoj, ILEI preparas novas 126-etapan retkurson.

En septembro 2011 ILEI petis al la landaj sekcioj, ke ilin kunlaboru aparte pri esplorado de eblaj kanaloj de

varbado de lernantoj kaj liverado de la kursoj.

En oktobro Ron Glossop nomumis tri homojn al komitato por esplori la eblecojn: **Jeremy Aldritch** (vic-prezidanto de AAIE) el Virginio, **Joe Blum** el Florido, kaj **Sherry Wells** (eduka sekretario de AAIE) de Miĉigano. Jeremy estras la komitaton. Se vi hava ideojn tiurilate, bv kontakti lin retroŝte ĉe la adreso gxeremio@gmail.com.

Simpozio de ILEI ĉe Universitato de Kopenhago

La 22-an kaj 23-an de julio 2011

Dum la finaj du tagoj de la 44-a konferenco de ILEI, okazis simpozio ĉe la universitato de Kopenhago, Danio. La temo estis tre grava: Lingva Politiko kaj Lingvaj Rajtoj en Edukado kaj Scienca Komunikado.

Kaj la Anglan kaj Esperanton oni uzis dum la simpozio, kiu estis subtenata de la Universitato de Kopenhago, Fakultato de Humanistiko—Departamento de Komunikiloj, Kogno kaj Komunikado kaj de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) de UEA, Roterdamo.

La vicprezidanto de ILEI pri universitata kaj scienca agado/komisiono, instru-teknologia evoluo kaj AAIE

membro, **Duncan Charters**, sperte gvidis la simpozion kaj bone faris trakukojn kaj en esperanton kaj en la anglan.

AAIE-a membro **Humphrey Tonkin** prelegis pri “Lingva Malegaleco en la Scienco” kaj helpis plani la simpozion kiel parto de la organiza komitato. Doktoro Tonkin estas direktoro de CED.

Tri aliaj AAIE-aj membroj, **Ron Glossop**, **Bill Harris** kaj **Chuck Mays** ĝuis la simpozion. Chuck faris video-registradon de la prelegoj. En la estonco la aŭdio-registrado de la prelegoj estos disponeblaj en la retpaĝaro de ILEI kaj la plano estas ke la video de la prelegoj estos havebla sur DVD.

Novjara salutmesaĝo de Stephan MacGill

Tuj la novjaraj sunradioj baptos Nov-Zelandon survoje al Aŭstralio kaj la cetera mondo. Jam 2012! Kiel tempo flugas! Tempo pritaksi 2011 kaj pripensi imperativojn kaj eblojn por la lastaj ses monatoj de la mandato de la nuna ILEI-estraro. Jen okazo preni rigardon pli vaste ol la nuraj horizontoj de nia Ligo, por konstati, ke jam eĉ delonge, ILEI fariĝis la dua ludanto sur la movada firmamento. Ni pri tio rajtas fieri – ĉar atingita per solida laboro kaj renoviga kampanjo, sed samtempe ni devas duobligi niajn fortojn por digne plenumadi tiun rolon.

Do, ni provu resumi la atingojn en la lasta jaro, kaj de la nuna mandato:

- Ni okazigis la plej grandan konferencon de ILEI en almenaŭ la lastaj 24 jaroj.
- Kadre de tio, ni organizis la plej sukcesan kaj ambician universitatan simpozion iam ajn.
- Ni realigis dramecan intensigon de la komunikado kun sekcioj, komitatoj kaj membroj.
- Ni starigis kaj praktike uzis retan voĉdonadon de la komitato de ILEI.
- Ni sukcesis enpostenigi novan tre aktivan sekretariojn por la Ligo
- Nia ekstarigado de ‘ILEI oficejo’ rezultis en firmigo de la membro-administrado.
- Ni financis plurjaran regulan apogadon de la instruista trejnado.

- Ni reprezentiĝis bonnivele en la Ĝenerala Konferenco de Unesko en oktobro 2011.
- Ni restarigis kunlaboron kun Kastelo Gresillon per komuna kurso kaj ekzamena sesio.
- Ni sukcesis enpostenigi novan administranton de la abonoj por Juna amiko.
- Ni akceptis en 2011 novajn sekciojn en Serbio kaj Meksiko.
- Ni subtenis du aranĝojn en Afriko kaj aktivis en la Azia Kongreso en Mongolio.
- Ni postsekvis la atingojn de la seminario de Matanzas en 2010.

Tiu sukceslisto estas dankebla al teameca estrara laboro, aktivigo de sekcioj, membroj kaj intensigo de rilatoj kun niaj partneroj.

Nun, ni rigardu antaŭen. Kion ni planas por la sekva jaro?

- Intensigo de nia kunlaborada kaj gvida rolo en la preparoj por la 125-jara jubileo de Esperanto.
- Konkretigo de la kunlaboro kun IFEF pri komuna seminario en la fervojista kongreso en majo.
- Pretigo de modulara, fleksebla skemo por instruista trejnado, realigebla en plej diversaj lokoj, manieroj kaj cirkonstancoj.
- Orda transdono de la liga regado al nova estraro. Tiucele

- deko da gvidiloj estas verkitaj kaj afiŝitaj, kiel tria tavolo en la vico 'Statuto-Regularo-Gvidilo'.
- Sukcesa realigo de la 45a Konferenco de ILEI en Kunming, kun bona partopren-nombro el diversaj kontinentoj, neforgeseblaj interkulturaj spertoj kaj valora programo. Tiucele nia respondeculo jam vizitis Ĉinion en novembro 2011, kaj abundaj informoj estas donitaj.
 - Simila sukceso por la planata universitata simpozio, kiu povos eĉ atingi danajn nivelojn, dank' al bonaj kontaktoj kun universitatoj en Kunming kaj Pekino.

Sed taskoj kaj defioj obstinas resti. Ni ne balau ilin subtapiŝen: serioza novjara mesaĝo devas ne nur saluti kaj bondeziri, skizi la tuj venontajn planojn, sed ankaŭ esplori niajn mankojn. Ni devas...

- Evoluigi la multlingvan retejon ĝis ni povos publike malfermi ĝin.
- Trovi novajn redaktorojn por pluvivigi la revuon Juna Amiko, kaj trovi por ĝi varbiston.
- Eldoni serion de bazaj du-lingvaj varbiloj (Eo+alia lingvo) post trovo de monrimedoj por tio.
- Aperigi la rezultojn de la tre sukcesa simpozio, okazigita kadre de nia dana konferenco.
- Daŭrigi la renovigon de nia Statuto, por ke la Ligo povu pli konvene funkcii.
- Daŭrigi la delongan serĉon por iu prizorgi niajn eksterajn rilatojn kaj nian historion.
- Daŭrigi la provon akiri kontaktpersonon en Britio kaj Rusio por ke tiuj landoj revenu al ILEI.
- Preni kontakton kun aktivuloj en Irano por restarigi sekcion tie; maturigi la peton el Armenio.
- Aktivi kun Latinameriko, por akiri sekciojn en Argentino, Bolivio, Urugvajo, Nikaragvo...
- Starigi kontaktojn kun Vjetnamio, prepare al UK tie kaj starigo de kurso antaŭ aŭ dum la UK.

- Labori plu por la nomigo de reprezentantoj en Mongolio, Indonezio, Nepalo, Vjetnamio...
- Meti la financadon de la laboroj je ekonomie subtenebla bazo sen ĉiujaraj deficioj.
- Porti la naskiĝantan 'oficejo de ILEI' al plena funkciado, sur stabila ekonomia bazo.

Kun tiuj pensoj, ni fermu la jaron, sed tio ne eblas sen amaso da dankoj, ĉar eĉ la eta ILEI dependas je la kombinitaj streboj de centoj da homoj por pluri. Ni plene konscias, ke multaj al vi faras grandajn ofertojn por liveri al ni la rezultojn, kiujn ni supre listigis. Ni dankas al niaj sekciestroj, al komitatanoj pro siaj pli aktivaj partoprenoj en nia decidado, al la LKK de nia 44a Konferenco en Kopenhago kaj al la Universitato de Kopenhago, al nia redaktoro de IPR, Jozefo Nemeth - samtempe prizorganto de nia retejo, al la teamo de Juna amiko, kaj precipe al nia demisianta redaktoro, Geza Kurucz, al niaj parteneroj, Katalin Kovats (edukado.net), Ilona Koutny (UAM kaj instruista trejnado), la stabanoj de Kastelo Gresillon, la Esperanto-urbo Herzberg kaj amaso da aliaj, tro multaj por nomi individue.

Mi persone dankas al miaj estraraj kolegoj – al Duncan pro majstra gvidado kaj tuja tradukresumado dum nia simpozio, al Radojica pro zorga konferenca planado kaj realigo, al Julija pro profesieca prizorgo de niaj kontoj, al Zsofia pro evoluigo de nia programo de instrusta trejnado, al Julian pro gvidado dum la Tago de la Lernejo kaj konferenca etoskreado kaj al Trezoro pro sia rapida enpostenigo kaj funkciado – nelaste – kune kun nia ĉina sekciestro kaj aliaj LKK-anoj en preparado por nia konferenco 2012.

Per tiuj pensoj, el la hieraŭ neĝkovrita sed hodiaŭ suna Herzberg, mi deziras al vi ĉiuj nome de ILEI prosperan kaj aktivan jaron en 2012!

*Stefan MacGill
Prezidanto de ILEI*



Komitatanoj en Kopenhago traboris rekorde ampleksan tagordon kaj multon atingis. (Videblaj en la fotografaĵo estas kvar membroj de AATE: Prezidanto **Ron Glossop** dekstre de la unua vico, Kasisto **Chuck Mays** maldekstre de la dua vico, **Bill Harris** meze de la dua vico, kaj **Duncan Charters** maldekstre de la lasta vico.)

Esperanto-Instruado en Usono

aliaj libroj.

Klasoj de Doroteo Holland

Cxiun merkredon Doroteo Holland havas klason por du spertaj Esperantistoj, kiuj kune legas Esperanto- tradukon de “Elektitaj Fabeloj” de Fratoj Grimm, kaj komparas cxiun kun la versioj kiujn ni konas.

Legogrupeto de Sally Lawton

Sally Lawton raportas, ke ŝi daŭre renkontiĝas kun unu-du amikoj por kune legi, ekzemple fabelojn el *Faktoj kaj Fantazioj* de Marjori Boulton kaj elektitaj verketoj de

Konversacia grupo en Durham

Preskaŭ ĉiusemajne kunsidas du-tri homoj en la oficejo de Gary Grady en Durham, Norda Karolino por konversacii vid-al-vid kaj ankaŭ televide pere de Google+ kun homoj ne la regiono kaj aliloke. Ofte partoprenas du Esperantistoj el Novmeksiko kaj de tempo al tempo aliaj de aliaj landoj, inkluzive Kazakion kaj Brazilon.

Lastatempe aperis nova partoprenanto, kiu estas studento ĉe la Universitato Duke, kaj kiu bone regas Esperanto dank’ al la senpagaj kursoj en Lernu.net.

Esperanto-Instruado Alilande

Kial Ĉinio Estas Fekunda Kampo por la Instruado de Esperanto

Prelego de Ron Glossop, Profesoro Emerita, Sud-Ilinojsa Universitato en Edwardsville ĉe ILEI-konferenco kaj UK Tago de la Lernejo en Kopenhago, Danlando, Julio 2011

Ĉu Ĉinio estas bona loko por la instruado de Esperanto? Esperanto estas okcidenta lingvo kiu estas multe pli simila al plejparto de la lingvoj de Eŭropo ol al la ĉina lingvo. Tial ŝajnas ke Ĉinoj probable ne povus tiel facile kaj tiel rapide lerni Esperanton kiel Okcidentuloj. Tamen mi volas argumenti ke nuntempe Ĉinio estas fekunda kampo por la instruado de Esperanto.

Kial? Unu kialo estas ke la registaro de Ĉinio estis kaj estas ĝenerale pli helpema al Esperanto kaj Esperantistoj ol aliaj landaj registaroj. En Ĉinio la landa registaro subtenas la eldonadon de revuoj kaj magazinoj. Oni povas legi, aŭdi, kaj vidi Esperantajn dissendojn ĉiutage per <esperanto.cri.cn> kaj <www.espero.com.cn>. La registaro dungas multajn homojn (eĉ eksterlandanojn) uzi Esperanton en sia ĉiutaga laboro. Kiom aliaj landaj registaroj elspezas tiom da mono por subteni la uzon de Esperanto?

Dua kialo instrui Esperanton en Ĉinio estas la kvanto de homoj kiu loĝas en tiu lando. Estas 1,34 miliardoj de homoj kiuj loĝas en Ĉinio. Preskaŭ unu el ĉiuj kvin homoj sur la planedo loĝas en Ĉinio. Se oni volas allogi multajn homojn al nia tutmonda lingvo, ni devus instrui Esperanton kie multaj homoj estas, nome en Ĉinio. Plue la influo de Ĉinio en la mondo kreskas, do estus bona afero por Esperanto se multaj Ĉinoj uzus ĝin.

Tria grava kialo estas la fakto ke nun en Ĉinio ĉiuj infanoj devas lerni la pinĵinan version de la skribita ĉina lingvo. Ili devas lerni alfabeton tre similan al la angla alfabeto kiun oni povas uzi por skribi la sonojn de la nuntempa ĉina lingvo. Pensu pri tio! La infanoj devas lerni uzi fonetikan latinan alfabeton. La principo estas simila al la skribita flanko de Esperanto. Tial kiam ĉinoj ekstudas Esperanton, la prononcado de la literoj kaj vortoj estas relative facila afero por ili. Ĉinaj Esperantistoj informas min ke kvankam ili ne povas kompreni la signifon de la esperantaj vortoj ne estas problemo prononci ilin. Sekve je la komenco de la studado de Esperanto la lernanto povas pensi, “Mi povas fari ĉi tion.”

La kvara kialo ke Ĉinio estas fekunda kampo por la

studado de Esperanto estas ke nun en Ĉinio la ĝeinfanoj kaj ĝejunuloj devas studi la anglan lingvon. En la neanglaparolantaj okcidentaj landoj oni ĝenerale opinias ke en la lernejoj ekzistas konflikto inter la studado de la angla lingvo kaj la samtempe studado de Esperanto. Sekve oni devas decidi ĉu instrui Esperanton aŭ la anglan. En tia situacio oni povas opinii ke la angla lingvo (kaj ankaŭ aliaj naciaj lingvoj) estas iom malamiko aŭ almenaŭ rivalo de Esperanto.

Sed kio estas la situacio en Ĉinio? Ŝajnus ke la postulo de la ĉina registaro ke la ĝelernantoj devas lerni la anglan ne helpus pri la instruado de Esperanto. Tamen por la ĉinoj la lernado de la angla kaj la lernado de Esperanto efektive helpas unu la alian en diversaj manieroj! Unue, estas multaj similaj vortoj kun la sama signifo. Ekzemple estas “tablo” kaj “table.” Estas “forko” kaj “fork.” Estas “blua” kaj “blue.” Estas “sociologio” kaj “sociology.” Estas “elefanto” kaj “elephant.” Estas “ŝuo” kaj “shoe.” Estas “orangĝa” kaj “orange.” Estas “rapida” kaj “rapid.” Estas “ŝi” kaj “she.” Estas “jes” kaj “yes.” Kaj tiel plu. Sekve kiam la ĉinaj ĝelernantoj lernas la anglan, ili samtempe lernas multajn vortojn en Esperanto kaj inverse. Ili ankaŭ povas facile uzi vortaron angla-al-esperantan eĉ se ili ne povas bone prononci la anglajn vortojn.

La lernado de Esperanto ankaŭ helpas rilate al la lernado pri la gramatiko de la angla. En la angla lingvo la gramatiko ofte estas neevidenta aŭ eĉ kaŝita, sed Esperanto povas klarigi la aferon. Ekzemple konsideru la anglan frazon “Monday I will see you” (“Lundon mi vidos vin.”). Gramitike la subjekto estas “I” (“mi”) kaj la verbo estas “will see” (“vidos”) kaj la rekta objekto estas “you” (“vin”). Sed kiu gramatika ero estas la unua vorto “Monday” (“Lundon”)? Per la studado de Esperanto, oni povas vidi ke en ĉi tiu angla frazo grava prepozicio mankas. La vera signifo de la unua vorto en tiu angla frazo estas “On Monday” (“Je lundo”). La vorto “Monday” efektive estas objekto de prepozicio kiu tute ne aperas en la angla. Jen nur unu ekzemplo de la maniero en kiu la studado de Esperanto

povas helpi ĉinajn lernantojn kompreni la gramatikon de angla frazo.

La tria maniero en kiu por Ĉinoj la studado de la angla lingvo kaj Esperanto helpas unu la alian rilatas al la interpunkcio kiu estas malsama ol en la ĉina lingvo. La interpunkcio estas tre simila en la skribata angla lingvo kaj skribata Esperanto. Oni nun ofte uzas la skribatan lingvon por retmesaĝoj kaj presitaj materialoj. Sekve la kapablo ĝuste uzi la interpunkcion estas grava afero.

Nuntempe la ĉina registaro postulas ke ĉiuj lernantoj lernu la anglan lingvon. Sendube estus pli bona situacio se la infanoj devis lerni Esperanton en la elementaj lernejoj antaŭ ol ili devas lerni la anglan. Feliĉe jam ekzistas en Ĉinio elementa lernejo kie la infanoj studas Esperanton antaŭ ol ili studas la anglan, nome, la lernejo Baiyangshujie en la urbo Taiyuan. Tie la lernejestro WEI Yubin (Jado) jado.wei@gmail.com, volas montri al la ĉina registaro ke infanoj pli bone kaj pli rapide lernos la anglan se ili antaŭe lernis Esperanton.

Tamen mi opinias ke en Ĉinio eĉ la nuntempa postulata lernado de la angla lingvo helpas rilate al la lernado kaj uzo de Esperanto. La ĉina lingvo estas tiel malsimila al eŭropaj lingvoj ke la lernado de okcidentaj lingvoj (eĉ Esperanto) estas tre malfacila afero por Ĉinoj. Sekve eble ne multaj Ĉinoj libere decidus peni lerni tiajn lingvojn. Sed kiam la gejunuloj devas lerni la anglan lingvon en la lernejoj, ili sekve havas bonan bazon por lerni Esperanton. Plue post kiam ili studis la anglan kaj eĉ ekrigardas Esperanton, ili tuj konstatas ke Esperanto estas multe pli facile lerni. Sendube en Ĉinio la angla lingvo estas multe uzata, sed por multaj Ĉinoj la scipovo de la angla lingvo estas tute pasiva. Multaj el ili povas iom legi ĝin sed ne povas paroli ĝin aŭ bone skribi ĝin. En Ĉinio kelkaj Esperantistoj unue lernis la anglan kaj poste konstatas ke pro tio ili povas pli facile lerni

kaj uzi Esperanton. Samtempe la Ĉinoj kiuj jam lernis Esperanton povas informi aliajn Ĉinojn pri la utileco de Esperanto rilate al la lernado de la angla lingvo.

Por eltrovi ĉu Ĉinoj konsentus kun miaj ideoj pri la rilato inter la lernado de la angla kaj la lernado de Esperanto mi antaŭe perrete sendis kopion de mia simila prelegeto al profesorino GONG Xiaofeng (Arko) xfgong2002@163.com, profesorino en Nanchang Universitato en Ĉinio. Jen ŝia respondo. “Mi tralegis vian artikolon. Mi tute konsentas kun vi. Temas pri mia lernado. En la komenco la angla lingvo multe helpis mian lernadon de Esperanto. Esperanto [ankaŭ] multe helpis mian relernadon de la anglan kiam mi preskaŭ forgesis la anglan lingvon antaŭ 20 jaroj. Dum lastatempaj jaroj mi trovis ke mia aŭdkapablo de Esperanto plialtiĝis kaj pro tio mi ankaŭ rimarkis, ke la aŭdkapablo de la angla lingvo sinsekve altiĝis multe. Do vi estas prava.”

Mi ne estas la sola Esperantisto kiu opinias ke Ĉinio estas fekunda kampo por la instruado de Esperanto. Profesoro Dennis Keefe keefeinchina@gmail.com jam instruis dum du jaroj ĉe la Universitato de Nankino. Li bone kunlaboras kun aliaj instruistoj de Esperanto en Ĉinio. Li nun organizos Universitaton de Esperanto ĉe la insulo Hajnano dum la venonta Januaro. La plano estas okazigi kutimajn 40-horajn universitatajn kursojn por la ĉinaj studentoj kiuj jam lernis Esperanton. Ili ne nur studos Esperanton. Ili uzos Esperanton por lerni pri aliaj aferoj. Dennis konsentas kun mi ke Ĉinio estas bona loko instrui Esperanton.

Mi ankoraŭ opinias ke en Ĉinio la plej bona sistemo estus instrui Esperanton unue en la elementaj lernejoj kaj poste la anglan kiel oni jam faras en la elementa lernejo en la ĉina urbo Taiyuan. Tamen mi opinias ke estas bona ideo instrui Esperanton en Ĉinio ankaŭ en la universitatoj post kiam la gejunuloj jam devis studi la anglan lingvon.

Kalendaro

April 2012

20-22 [107-a Skota kaj 93-a Brita kunkongreso de Esperanto](#) en Edinburgo, Skotlando. Sekvos postkongresaj ekskursoj. Rete: britakongreso.org

Majo 2012

19-21 [9-a MEKARO - Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto](#) en Kebeko, Kanado. Turisma amikeca semajnfino. Okazas vizitoj kaj komunaj manĝoj en restoracioj. Rete: mekaro.ca/Bonvenon.html

Junio 2012

22-25 [60-a Landa Kongreso de Esperanto-USA](#) ĉe la Universtitato de Teksaso en Dalaso. La 53-a Jarkunsido de Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto okazos kadre ĉi tiu kongreso. Rete: esperanto-usa.org/node/2317

Julio 2012

9-26 [Per Trans-Siberia Fervojo de Moskvo al Hanojo](#) (Parto de la vojaĝo estos per aŭtobuso kaj aliaj

trajnoj.) Inkluzivas [ekskursojn](#) en Irkutsk, Bajkalo, Ulaanbaatro, Beijing (Pekino), kaj Kunming. (Bedaŭrinde alvenas en Kunming la 23-an de julio, meze de la Konferenco de ILEI.) Rete: vojagxo.info

16-20 [9-a kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio](#) en Galway, Irlando. Rete: eeu-kongreso.webnode.com

20-26 [45-a Konferenco de ILEI](#) en Kunming, Ĉinio. Rete: ilei.info

21-29 [5-a Renkontiĝo de Uzantoj de Lernu.net](#) en Nitra, Slovakio. Rete: lernu.net

28-4 aŭgusto [97-a Universala Kongreso de Esperanto](#) en Hanojo, Vjetnamio. Rete: uea.org/kongresoj/uk_2012.html

Aŭgusto 2012

5-11 [68-a Internacia Junulara Kongreso](#) en Hanojo, Vjetnamio. Rete: www.tejo.org

Aktuala listo de multaj aliaj E-aranĝoj daŭre konsultebblas ĉe <http://www.eventoj.hu/kalendar.htm>

Nekrologo

D-ro Stanley J. Drake (8 marto 1916–2 decembro 2011)


Stanley J. Drake PhD, longdaŭra instrustio de Esperanto, forpasis la 2-an de decembro en Atlanto, Georgio, Usono post vivo de 95 jaroj.

Li esperantistiĝis en la 70-aj jaroj kaj tre vigle aktivis post sia emeritiĝo kiel prezidanto de Fort Lauderdale University en Florido, ĉeestante plurajn Universalajn Kongresojn kaj multajn landajn kaj regionajn kongresojn, kelkajn el kiuj li helpis organizi. Li instruis Esperanton en universitataj kaj neformalaj kursoj diversloke, inkluzive en la propra domo, kaj ankaŭ multe informadis pri Esperanto. En la 90aj jaroj artikolo pri la spertoj d-ro Drake en Esperantio (kaj pri lia hundo, al kiu li kutimis paroli esperante) aperis en la tagĵurnalo de Charlotte, Norda Karolino, kaj represiĝis en aliaj ĵurnaloj en multaj partoj de Usono.

Li membris en Universala Esperanto-Asocio, kelkaj landaj asocioj, Esperanto-Societo de la Karolinoj kaj Virginio (kiun li helpis fondi), Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, kaj Amerika Asocio de Esperanto-Instruistoj.

En la jaro 1978 d-ro Drake fondis la Internacian Societon de Amikeco kaj Bonvolo kaj servis multajn jarojn kiel ties ĝenerala sekretario kaj poste prezidanto.

Ekster la Esperanto-movado, d-ro Drake instruis en pluraj universitatoj kaj en 1968 fondis Amerikan Asocion de Prezidantoj de Sendependaj Kolegioj kaj Universitatoj. Ses kolegioj kaj universitatoj nomis lin honoriga doktoro, kaj la 10-an de majo 1973 Senatano Lawton Chiles laŭdis lin en la usona senato pro lia laboro en la kampo de la alta edukado. Li kaj lia edzino Virginia (kiu mortis kelkajn jarojn antaŭ li) multe vojaĝis tra la tuta mondo. Postvivas lin liaj tri filinoj kaj iliaj familioj.



Stan Drake kun kelkaj familianoj en 2009

Novaĵoj

Translate.google.com now supports Esperanto

On February 23 Esperanto became the 64th language supported by Google's automated translation system. Google has long had support for Esperanto in its main search engine service, but the addition of computerized translation is a major additional offering.

Google's official announcement noted, "L.L. Zamenhof, the inventor of Esperanto, began his quest for an easy-to-learn language shared by all people in the 1870s. One hundred and twenty-five years later, Esperanto has hundreds of thousands of active speakers, millions of people with some knowledge of the language, and even a few hundred people who learned it from birth from their parents.

"Esperanto and Google Translate share the goal of helping people understand each other—a connection that others have made in the past <<http://goo.gl/7ITsr>>. We're excited to bring the two together today!"

As with machine translation in general, the results are imperfect. It appears that translations from Esperanto tend to be better than translations into Esperanto, presumably in part because Esperanto itself is typically less ambiguous than

other languages.

Even imperfect translations can be useful. For example, beginning Esperanto student who comes upon a difficult passage may find a Google translation a good alternative to translation word-by-word with a dictionary. More generally, someone needing to translate some text into or out of Esperanto may find it easier to edit an imperfect automated translation than to do all the work from scratch. You can find Google's translation feature at <http://translate.google.com>.

Esperanto news website launched

The website Nunonia <nunonia.com> appeared in late February as a source of news in Esperanto on a diversity of topics not limited to the language itself. The site is very professional in appearance and its short news items, updated every day, could make interesting reading matter for students past the beginner stage, but its typographical errors may be confusing.

Nunonia.com in many respects resembles the earlier highly popular news site Ĝangalo (Gxangalo.com), which operated in the years 2003-2006. The similarity is not surprising, since both Ĝangalo and Nunonia were initiated

by Brazilian Esperantist and entrepreneur Flávio Rebello, who besides Ĝangalo also launched an Internet television station in Esperanto, Internacia.tv, in late 2005. Unfortunately, personal reasons caused Rubello to exit the business in late 2006 and both Internacia.tv and Ĝangalo ceased to be active.

Now Rebello (who also spells his last name with a single L in Esperanto) has returned to start Nunonia, whose editor in chief is Cândido Ruiz. *Libera Folio's* article at www.liberafolio.org/2012/gangala-rebello-revenas provides some additional information.

Other websites useful in teaching

Lernu.net: A site devoted to teaching Esperanto, with courses at multiple levels, reference material, reading matter, learning aids, at ways to interact with other Esperanto speakers at every level. Today Lernu.net is probably the most popular way to learn Esperanto.

Edukado.net: A source for materials of use to teachers and students, including video clips, exercises, exams, sample posters for promoting a course, and many other things.

Icxl.org: The website of Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo, the organization started by the late Charlotte Kohrs to teach Esperanto to children. Like Edukado.net a source for teaching materials, but here aimed at children.

Muzaiko.info: The name is a bit of wordplay combining Mozaiko and Muziko. (Note that the URL ends in .info rather than .com.) Muzaiko is an Internet-based radio station that broadcasts various types of popular music in Esperanto along with some other programming.

AAIE.us: Our own website.

ILEI.info: The website of the International League of Esperantist Teachers, our parent organization.

New linguistics journal

Lingvistik', a publication of the International University in Karlovo, Bulgaria, plans to publish scientific articles on linguistics, with each in the author's native language and in Esperanto, partly to encourage the use of other languages in scientific publications. More information can be found at the website <lingvistik.weebly.com>

City Weekends in Esperanto

Last year Chuck Smith, who lives in Berlin but was coming to the U.S. for a visit, decided to organize a small

informal Esperanto get-together for late November in Harrisburg PA. A total of 16 people from three countries took part, and inspired by that success, a second Urba Semajnfino is scheduled for Richmond, Virginia, March 24-25. (For more information about that meeting, visit the esperanto-usa.org website and search for "Richmond.")

Chuck had previously initiated a similar one-day event in Harrisburg almost by accident. As he described it, "In 2009, when I last visited the USA, I wanted to meet a new Esperanto speaker in Williamsport PA and invited him to join Judith and me for lunch in Harrisburg at an Indian restaurant called Passage to India. On a lark, I informed a friend in New Jersey about it and he decided to come out too. Then I told someone I knew in Washington and he brought friends along. In the end, we had 10 people visiting from 4 different cities!"

So while planning his next trip in November 2011 he decided to repeat the idea, but this time for the whole weekend. , it occurred to him that thanks to the Internet, he could organize a meeting in Pennsylvania from his home in Berlin. Thanks to the Internet, he was able to do most of the planning from his home in Berlin.

Saturday began with a lunch buffet at the same Indian restaurant followed by a visit to a local tourist attraction, Hershey's Chocolate World. Saturday evening was left open for whatever the participants decided to do. Sunday morning was spent at a Civil War museum, followed by an early afternoon lunch at a Thai restaurant and more conversation.

"Notice that I added an empty Saturday evening to not overwhelm the participants," Chuck wrote. "As an organizer, it's quite tempting to try to fill up the entire schedule. Don't! People need time to relax and do whatever, and often these 'unorganized' times are the most memorable of a meeting. From what I hear from long-time Esperanto meeting attendees, after a few years, they just start ignoring the program and just hang out with their friends they haven't seen in a long time. I can only agree with that from personal experience."

The Richmond schedule is similar: Lunch Saturday at a Thai restaurant followed by a trip to the Virginia Museum of Fine Arts, followed by a visit to a park on Sunday and a mid-afternoon Ethiopian restaurant.

In both Harrisburg and Richmond arrangements were made for people to share hotel rooms to keep the cost per person down, and both cities can be reached by relatively inexpensive means of travel.

Bonvolu kontribui al la *Bulteno!*

Ĉu vi trovis interesan lernolibron, havas konsilon pri instruado, volus raporti interesan sperton en via lernado aŭ instruado de Esperanto (lastatempe aŭ antaŭ jard ekoj!), aŭ havas ion ajn por diri kiu eble interesus viajn kunlegantojn de ĉi tiu *Bulteno*, bonvolu sendi viajn kontribuojn al la

redaktoro (adreso sur la unua paĝo). Bonvenaj estas leteroj, retmesaĝoj, artikoloj ĉu longaj aŭ mallongaj, en la angla aŭ Esperanto (aŭ eventuale alia lingvo), kaj aparte fotografiaĵoj.

La limdato por la venonta numero estas la 23-a de aprilo 2012.

American Association of Teachers of Esperanto

COURSE REPORT FORM

INSTRUCTOR

Name Address _____
Email address _____

COURSE

Location _____
Tuition cost _____
Level: Elementary _____ Intermediate _____ Other _____
Beginning and ending dates _____
Number of lessons _____ Duration of each lesson _____
Material used: Books _____
Videos _____
Other _____

STUDENTS

Number finishing course _____ Age range _____
Previous language skills _____
Is the course shown in the student records? _____
Was an AATE exam administered? _____

FORMATION OF CLASS

Name of organizer _____
Publicity method used _____
Supplier of course materials _____

COMMENTS OF INSTRUCTOR

Concerning publicity

Concerning materials

Concerning teaching

Please return this form to:

Sherry Wells
P.O. Box 1338
Royal Oaks, MI 48068

E-mail: <esperantosherry@tm.net>

American Association of Teachers of Esperanto

MEMBERSHIP FORM

Voting members consist of professional educators (either active or retired) who are interested in Esperanto, and non-professionals who teach, have taught, or intend to teach Esperanto.

NAME _____ PHONE () _____

ADDRESS _____

CITY. STATE _____ ZIP _____

E-MAIL ADDRESS _____

I do not want the following information to appear in the AATE membership list:

My telephone number My e-mail address Other _____

NAME & ADDRESS OF SCHOOL _____

Are you a professional educator? Yes, active Yes, retired No

Memberships are for the calendar year. If you join in the middle of the year, you will receive “Bulletins” previously distributed during that year. All AATE members are automatically members of the International League of Teachers of Esperanto (Internacia Ligo de Instruistoj de Esperanto) and receive their quarterly *Internacia Pedagogia Revuo*.

Please check one membership category below:

One year membership with publications by mail in paper form: \$40

One year membership with publications via the Internet in PDF form: \$20

If a one-year membership, for what calendar year? 20____

New Renewal Today’s date: _____

I wish to give \$ _____ as a donation to AATE.

Make your check payable to “American Association of Teachers of Esperanto” or “AATE” and mail it with this form to Koresponda Sekretario: Dorothy Holland, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara CA 93111.